Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

STIFTUNG BSW

Numero 2 Aprilo - Junio 2016

Dresden invitas

Dresden lädt ein



Trajno de Lößnitzgrundbahn forlasas la stacion Radebeul-Ost (vd. paĝo 5)
(Foto: X-Weinzar Wikimedia)

Ein Zug der Lößnitzgrundbahn verlässt den Bahnhof Radebeul-Ost (s. Seite 5)
(Foto: X-Weinzar Wikimedia)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Preter la grandaj vortoj	3	Jenseits der großen Worte	3
„Morsch'n" – Dresden invitas	5	„Morsch'n" – Dresden lädt ein	5
Pensante pri Elfriede	9	In Gedanken über Elfriede	9
Korekto en terminologia laboro	11	Korrektur in der Terminologiearbeit	11
Pensiulaj revoj	12	Rentnerträume	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

Ni inĝenieroj en la gvida kaj sekuriga tekniko de la fervojo planante kaj konstruante novajn instalaĵojn ĝenerale estas suspektataj, kiel lancopinto de la entreprena estraro unuavice realigi ties raciigajn planojn.
Per kio ni unuflanke argumentas, estas la neceso, ekonomiece funkciigi liniojn por eviti la alternativon de la trafikĉesigo.
Aliflanke ĉiu nova instalaĵo ĝenerale signifas ankaŭ gajnon je sekureco – almenaŭ se la tekniko transprenas de la priservanto gravajn kontrolojn.
La ideon, simple apliki pli da tekniko la inĝenieroj tamen renkontu skeptikaj – ne nur depost Fukuŝima.
La tekniko transprenas de la priservanto kontrolojn, sed malŝarĝas lin de respondeco nur tiel longe kiel la kontroloj havas la atenditan rezulton. Se ili tion ne havas, la tekniko redonas la respondecon al la priservanto, kiu nun mem devas havigi al si superrigardon pri la situacio kaj decidi la necesajn konsekvencojn.
Kiu ne konscias pri tio, endanĝerigas eble homan vivon.
Potenca tekniko moderigas la kapablon de respondeco.
Pri tio mi pensas, se mi legas la informojn pri la terura akcidento en Bad Aibling, se estas raportataj la sukcesoj en la eksperimentoj pri la senkondukista trafiko sur reloj kaj strato, aŭ se plian fojon aŭtomobilisto estas menciata en la gazeto, kiun lia navigacia sistemo gvidis en junan pinarbaron.
Bezonata tie estas tekniko-prudento pli ol tekniko-entuziasmo.

Salutas vin

Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

Wir Ingenieure in der Leit- und Sicherungstechnik bei der Bahn stehen bei Planung und Bau neuer Anlagen allgemein im Verdacht, als Speerspitze der Unternehmensleitung in erster Linie deren Rationalisierungspläne durchzusetzen.
Womit wir einerseits argumentieren, ist die Notwendigkeit, Strecken wirtschaftlich zu betreiben, um der Alternative der Stilllegung zu entgehen.
Andererseits bedeutet jede neue Anlage im Allgemeinen auch einen Zugewinn an Sicherheit - zumindest wenn die Technik dem Bediener wichtige Prüfungen abnimmt.
Der Idee, einfach mehr Technik einzusetzen, sollten die Ingenieure - nicht erst seit Fukushima - trotzdem mit Skepsis begegnen.
Die Technik nimmt dem Bediener Prüfungen ab, entlastet aber ihn nur von der Verantwortung, solange die Prüfungen das erwartete Ergebnis haben. Haben sie das nicht, gibt die Technik die Verantwortung an den Bediener zurück, der sich nun selbst einen Überblick über die Sitation verschaffen und die notwendigen Konsequenzen daraus ziehen muss.
Wer sich darüber nicht klar ist, gefährdet möglicherweise Menschenleben.
Eine leistungsfähige Technik lässt die Fähigkeit zur Verantwortung abstumpfen.
Daran denke ich, wenn ich die Nachrichten über den schrecklichen Unfall in Bad Aibling lese, wenn von den Erfolgen bei den Versuchen zum fahrerlosen Verkehr auf Schiene und Straße berichtet wird, oder wenn wieder einmal ein Autofahrer in der Zeitung steht, der sich von seinem Navigationssystem hat in eine Fichtenschonung führen lassen.
Da ist eher Technik-Vernunft gefragt als Technik-Begeisterung.

Es grüßt euch

Guido Brandenburg

Preter la grandaj vortoj
Reinhold Ritthaler 02.11.1934 – 31.03.2016



Reinhold Ritthaler kiel helpanto por la gastoj de la Universala Kongreso 1958 en Mainz / Reinhold Ritthaler als Helfer für die Gäste des Weltkongresses 1958 in Mainz

Do kiel vi tion travivis? Kiel vin tio impresis kaj eventuale influis? Kian rolon ludis tiu tre speciala lingvo? Tiajn demandojn kompreneble interŝanĝas homoj naskiĝintaj en esperantistaj familioj. Iam interplektiĝas la radikoj, aperas nomoj de komunaj geamikoj, sub la polvo de la pasinteco retroviĝas komunaj aventuroj. La decida demando tamen koncernas la instigantojn, la gepatran generacion, al kiu apartenis Reinhold Ritthaler.

Kion pensas knabo en la maŝinaro de la nazia reĝimo, perdinta la patron ĉe la fronto, manovrita en regionon de ŝajna trankvilo, tamen ne blinda en la absoluta detruo de vivo kaj valoroj?

La deziro liberiĝi de la preskribitaj limoj, paroli kun la „poreternaj malamikoj“, interŝanĝi la ideologian balaston kontraŭ propraj konvinkoj por Reinhold tutcerte estis la motivo interesiĝi pri Esperanto, la sennacia lingvo.

Kun la Germana Federacia Respubliko en la jaro 1949 fondiĝis ankaŭ la Germana Federacia Fervojo. Ĝi samjare ofertis al Reinhold laboron kaj certagradan sekurecon en la

Jenseits der großen Worte
Reinhold Ritthaler 02.11.1934 – 31.03.2016

Wie hast du das erlebt? Wie hat dich das beeindruckt und vielleicht beeinflusst? Welche Rolle hat diese sehr spezielle Sprache gespielt? Solche Fragen tauschen selbstverständlich Menschen aus, die in Esperantistenfamilien geboren wurden. Irgendwann verflechten sich die Wurzeln, tauchen Namen gemeinsamer Freunde auf, finden sich unter dem Staub der Vergangenheit gemeinsame Abenteuer wieder. Die entscheidende Frage dreht sich aber um die Initiatoren, die Elterngeneration, zu der Reinhold Ritthaler gehört hat.

Was denkt sich ein Junge in der Maschinerie des Nazi-Regimes, der seinen Vater an der Front verloren hat, der in eine scheinbar ruhige Gegend verschoben wurde, der trotzdem nicht blind ist in der absoluten Zerstörung von Leben und Werten?

Der Wunsch, sich aus den verordneten Grenzen zu befreien, mit den „Erbfeinden“ zu reden, den ideologischen Ballast gegen eigene Überzeugungen zu tauschen, war für Reinhard ganz sicher das Motiv, sich für Esperanto zu interessieren, die Sprache ohne Nation.

Mit der Bundesrepublik Deutschland wurde im Jahr 1949 auch die Deutsche Bundesbahn gegründet. Sie bot Reinhold Arbeit und eine gewisse Sicherheit im Betriebsdienst an. Reinhold ließ sich in Neustadt (Weinstraße) nieder, wo Erasmus Zilles seine mit Dias illustrierten Reiseberichte vortrug „Mit Esperanto um die Welt“.

Dieser Funke reichte. Reinhold begann die Sprache zu lernen, gründete eine Gruppe und begannn zu reisen. Sein Name taucht 1952 unter den Teilnehmern des vierten Internationalen Eisenbahner-Kongresses in Lindau auf.

Während des TEJO-Kongresses 1956 in Büsum war seine Kongressnummer die 117, die von Fräulein Irmela Gießner die 112.

Nun kann man mutmaßen, ob es beim nachfolgenden Weltkongress in Kopenhagen irgendwelche Verabredungen mit Irene Gieß-

funkcia servo. Reinhold ekloĝis en Neustadt (Weinstraße), kie Erasmus Zilles prezentis siajn diapozitive ilustritajn vojaĝraportojn „Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo“.

Tiu sparko sufiĉis. Reinhold eklernis la lingvon, fondis grupon kaj komencis vojaĝi. Lia nomo aperas inter la partoprenantoj de la kvara Internacia Fervojista Kongreso en Lindau 1952.

Dum la TEJO-kongreso 1956 en Büsum lia kongresnumero estis 117, tiu de fraŭlino Irmela Gießner 112.

Nun eblas diveni ĉu dum la sekvanta Universala Kongreso en Kopenhago okazis iaj interkonsentoj kun Irene Gießner, la patrino de Irmela. Se jes, la rezulto ĉiakaze ne estis negativa.

La geedziĝo de Reinhold kaj Irmela estis fundamento por familio kun kvar infanoj, siaflanke naskitaj en Esperanto-infektitan medion.

La tempo ĉe la fervojo por Reinhold finiĝis en la jaro 1967. Apud la laboro li estis lerninta kaj pasinta la abiturientan ekzamenon. Nun li alstrebis sian veran profesion, tiun de instruisto. Sukcesa pedagogia studo malfermis la pordon kaj ekde 1970 ĝis emeritiĝo 1996 li en Winnweiler gvidis gejunulojn tra la mezgrada lernejo. Kvankam ne plu fervojisto li restis interesita kaj fidela membro de la Esperanto-fervojistoj.

En la Esperanto-movado Reinhold (antaŭ la fono de la propraj spertoj, mi konjektas) ne pensis pri grandaj vortoj, torĉoj, bataloj kaj fina venko. Reinhold praktikis Esperanton. Ĝi estis perspektivo, ĝi estis mondpercepto kaj en tiu senco ankaŭ transdonita al la sekvanta generacio.

Reinhold Ritthaler estis 81-jara, veka kaj sportema. Tial lia morto la 31.03.2016 por familio kaj konatoj estis neatendita.

La geamikoj de GEFA sincere bedaŭras lian forpason kaj kondolencas lian familion.

Guido Brandenburg

ner, Irmelas Mutter, gegeben hat. Wenn ja, war das Ergebniss in keinem Fall negativ.

Die Hochzeit von Reinhold und Irmela war das Fundament für eine Familie mit vier Kindern, ihrerseits hineingeboren in eine Esperanto-infizierte Umgebung.

Die Zeit bei der Eisenbahn endete für Reinhold im Jahr 1967. Neben der Arbeit hatte er gelernt und das Abitur bestanden. Nun strebte er seinen wahren Beruf an, den eines Lehrers. Ein erfolgreiches Pädagogikstudium öffnete ihm die Tür und von 1970 an bis zu seinem Ruhestand 1996 führte er in Winnweiler Jugendliche durch die Hauptschule. Obwohl er kein Eisenbahner mehr war, blieb er ein interessiertes und treues Mitglied der Eisenbahner-Esperantisten.



In der Esperanto-Bewegung dachte Reinhold (vor dem Hintergrund der eigenen Erfahrungen, behaupte ich) nicht an große Worte, Fackeln, Kämpfe und den Sieg am Ende. Reinhold wandte Esperanto an. Es war eine Perspektive, eine Weltwahrnehmung und in diesem Sinn auch der nachfolgenden Generation weitergegeben.

Reinhold Ritthaler war 81 Jahre, wach und sportlich. Deshalb war sein Tod am 31.03.2016 für Familie und Bekannte unerwartet. Die Freundinnen und Freunde der GEFA bedauern seinen Weggang und kondolieren seiner Familie.

(trad. Brandenburg)

„Morsch'n!“ - Dresden invitas

„Morsch'n!“ - Dresden lädt ein



La penda funikularo en Dresden-Loschwitz / die hängende Bergbahn in Dresden-Loschwitz
(Foto: Norbert Aepli, WikiMedia)

Ne necesas prezenti Dresden, la saksan metropolon, kiu antaŭ 13 jaroj jam gastigis la 55-an IFEF-Kongreson kaj tiel jam rekomendis sin kiel lokon por la ĉijara GEFA-jarkunveno.

La urbo ne nur montras riĉan panoramon formitan de renomaj arkitektoj kiel Gottfried Semper, Heinrich von Brühl, Matthäus D. Pöppelmann kaj George Bähr.

En Dresden kaj la proksima ĉirkaŭaĵo troviĝas ankaŭ kvanto de diversspecaj reltrafikaj trezoroj. Ni pensu pri la parkfervojo kun 381 milimetra trako longa respektindajn 5,6 kilometrojn, aŭ la pri du funikularoj en la kvartalo Loschwitz – unu staranta la alia pendanta, aŭ pri la 750 milimetra etŝpura Lößnitzgrundbahn, kiu transportas turistojn de Radebeul preter Moritzburg kun la baroka ĉaskastelo de la same baroka Aŭgusto II., la 16,5 kilometrojn al Radeburg. Ĉiuj estas vizitindaj celoj ne

Nicht notwendig, Dresden vorzustellen, die sächsische Metropole, die vor 13 Jahren schon den 55-ten IFEF-Kongress beherbergt und sich damit schon als Ort für das diesjährige GEFA-Jahrestreffen empfohlen hat.

Die Stadt zeigt nicht nur ein reiches Panorama, gestaltet von renommierten Architekten wie Gottfried Semper, Heinrich von Brühl, Matthäus D. Pöppelmann und George Bähr.

In Dresden und der nahen Umgebung findet sich auch eine Menge verschiedenartiger Schätze des Schienenverkehrs. Denken wir an an die Parkeisenbahn mit einem 381-Millimeter-Gleis und einer Länge von respekteinflößenden 5,6 Kilometern, oder an die zwei Bergbahnen im Stadtteil Loschwitz – die eine stehend, die andere hängend, oder an die Lößnitzgrundbahn mit 750-Millimeter-Schmalspur, die Touristen von Radebeul

nur por fervojinteresatoj.
La jarkunveno okazos en hotelo Dresden Domizil, ĉarma, malgranda hotelo en stilo de nobla ĝardena kolonio. Tamen la hotelo situas relative centre, proksime al la novinstalita fervoja haltejo Dresden-Trachau, do bone atingebla ankaŭ de fervojaj vojaĝantoj.



Domoj de la hotelo / Häuser des Hotels

Ni havos okazon tie matenmanĝi („Frieschdügg“ asertas la saksa vortaro) kun kafo preparita per eltrovaĵo de Melitta Bentz kaj vespere ripozigi la bierglason sur la ideo de Robert Sputh, ambaŭ gefiloj de la urbo Dresden.
Ankaŭ aliaj manĝoj tie estos riceveblaj. Dependos de la vizitoj kaj ekskursoj, ĉu ni povos akcepti la oferton.
Antaŭvidita estas promeno tra Loschwitz, promeno eble ankaŭ al la famaj urbocentraj lokoj, certe vojaĝeto en nostalgiaj vagonoj flarante la parfumon de diligenta cisternlokomotivo, eble kun reverenco al Aŭgusto.
Okazos enkonduka Esperanto-kurso. Okazos laborkunvenoj de la GEFA-aktivuloj. Okazos eble mallonga fakprelego. Sed okazos certe longaj vesperoj kun instigaj konversacioj en amika etoso.

vorbei an Moritzburg mit dem barocken Jagdschloss des ebenso barocken August II., die 16,5 Kilometer nach Radeburg bringt. Alle sind besuchenswerte Ziele nicht nur für Eisenbahninteressierte.
Das Jahrestreffen wird im Hotel Dresden Domizil stattfinden, einem netten, kleinen Hotel im Stil einer vornehmen Kleingartenanlage. Das Hotel liegt trotzdem verhältnismäßig zentral, nahe am neu eingerichteten Eisenbahnhaltepunkt Dresden-Trachau, also gut erreichbar auch für Bahnreisende.
Wir werden dort Gelegenheit zum Frühstükken haben („Frieschdügg“ behauptet das Sächsisch-Wörterbuch) mit Kaffee, der mit einer Erfindung von Melitta Bentz zubereitet wurde, und abends das Bierglas auf einer Idee von Robert Sputh abstellen, beide Kinder der Stadt Dresden.
Auch andere Mahlzeiten werden dort zu bekommen sein. Es wird jedoch von den Besuchen und Ausflügen abhängen, ob wir das Angebot werden annehmen können.
Vorgesehen ist ein Spaziergang durch Loschwitz, ein Spaziergang vielleicht auch zu den berühmten Plätzen im Stadtzentrum, sicher eine kleine Reise in nostalgischen Waggons, das Parfum der fleißigen Tenderlokomotive in der Nase, vielleicht mit einer Reverenz an August.
Es wird einen Esperanto-Einführungskurs geben. Es wird Arbeitssitzungen der GEFA-Aktiven geben. Es wird vielleicht einen kurzen Fachvortrag geben. Es wird aber sicher lange Abende geben, mit anregenden Gesprächen in freundschaftlicher Atmosphäre.

Tranoktaj kostoj pagendaj al la hotelo / Übernachtungskosten an das Hotel zu zahlen
3 noktoj po persono / 3 Nächte pro Person

en 1-lita ĉambro inkl. matenmanĝo / im Einbettzimmer incl. Frühstück	165,- €
en 2-lita ĉambro inkl. matenmanĝo / im Zweibettzimmer incl. Frühstück	117,- €

Tagmanĝo kaj vespermanĝo en la hotelo laŭ individua mendo kaj pago
Mittagessen und Abendessen im Hotel nach individueller Bestellung und Zahlung

Guido Brandenburg (trad. Brandenburg)

Aliĝilo por la GEFA-jarkunveno 06.10.-09.10.2016 en Dresden
Anmeldeblatt für die GEFA-Jahresversammlung in Dresden

Aliĝo ĝis
Anmeldung bis
18.07.2016

aliĝanta persono
anmeldende Person

antaŭnomo Vorname	familia nomo Familienname
Adreso Adresse	

BSW-subtenanto, familiano
BSW-Förderer, Familienmitglied …… ☐

partopreno en enkonduka Esperanto-kurso
Teilnahme am Esperanto-Einführungskurs …….. ☐

dua persono en dulita ĉambro
zweite Person im Doppelzimmer

antaŭnomo Vorname	familia nomo Familienname
Adreso Adresse	

BSW-subtenanto, familiano
BSW-Förderer, Familienmitglied …… ☐

partopreno en enkonduka Esperanto-kurso
Teilnahme am Esperanto-Einführungskurs …….. ☐

Partoprenkotizo
Teilnahmebeitrag

(inkl. promenon Dresden-Loschwitz kun funikularoj kaj trajnekskurson al Radeburg)
(einschl. Spaziergang Dresden-Loschwitz mit Bergbahnen und Zugausflug nach Radeburg)

aliĝanta persono *anmeldende Person*		25,- €
dua persono en dulita ĉambro *zweite Person im Doppelzimmer*	25,- €	_____ €
	entute insgesamt	_____ €

La partoprenkotizon mi ĝiris al la konto
Die Teilnahmegebühr habe ich auf das Konto überwiesen

Konto: Stiftung BSW Esperanto Essen
IBAN: DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC: GENODED1SPE
Kaŭzo / Grund: „GEFA-JaV 2016“

_____ _____
loko, dato subskribo
Ort, Datum Unterschrift

Bonvolu sendi ĝis **18.07.2016**
Bitte einsenden bis zum

al: **Dr. Heinz Hoffmann**
an: **Finstere Gasse 2**
DE-01445 Radebeul

aŭ per retpoŝto al:
oder per EMail an: fervoja.esperantisto@t-online.de



Pensante pri Elfriede

Elfriede Kruse naskiĝis la 13-an de Marto 1914 kaj mortis 19-an de Marto 2016, ĵus post kompletigo de la 102-an vivojaro.



Naskiĝtaga promeso en Bona Espero: Mi fariĝos minimume centjara!
Ein Geburtstagsversprechen in Bona Espero: Ich werde wenigstens hundert!

Ŝi naskiĝis ĝustatempe por komplete travivi du mondmilitojn, la ĝermantan demokration, la estingon fare de la nazifaŝismo, la kompletan detruon, la rekonstruon, la elpaŝon el izolo, la falon de la muroj, la optimismajn paŝojn en la projekton Eŭropo, same kiel la komencantan disfalon.

Mi ne konis iun ajn, kiu havis le eblon observi la okazaĵojn surterajn tiel longan tempon. Kaj mi ne konis multajn, kiu direktis sian ĉefan atenton dum tiu tempo al la homoj ĉirkaŭ si. La rigardo dume estis empatia kaj pripensema kaj ebligis al ŝi kompreni la valoron de la persona senpera parola interkompreniĝo.

Elfriede ne plu memoris ekzakte daton kaj okazon, je kiu ŝi unuafoje aŭdis pri Esperanto. Estis en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento, kiam fervoja instruisto donis al ŝi libron en la manon. Ŝi interesite eklernis, sed baldaŭ devis paŭzi pro familia okazaĵo. Post translokiĝo al Frankfurt ŝi tie en kurso rekomencis lerni, pasis kursfinan kaj samjare instruistan ekzamenon. Ŝi organizis propran kurson, fondis grupon, interkonatiĝis kun Gernot kaj Elisabeth Ritterspach, aliĝis al la fervojista movado. La unua IFEF-kongreso, al kiu ŝi vojaĝis, laŭ ŝia memoro okazis en Rijeka. En tiuj jaroj ŝi komencis kroĉi tutmondan reton de amikoj fidelaj dum jardekoj.

In Gedanken über Elfriede

Elfriede Kruse wurde am 13. März 1914 geboren und starb am 19. März 2016, gerade nach Vollendung des 102. Lebensjahrs.

Sie wurde rechtzeitig geboren, um vollständig zwei Weltkriege, die aufkeimende Demokratie, das Auslöschen durch den Nazifaschismus, die vollständige Zerstörung, den Wiederaufbau, das Hinaustreten aus der Isolation, den Fall der Mauern, die optimistischen Schritte in das Projekt Europa, ebenso wie den beginnenden Zerfall.

Ich habe niemanden gekannt, der die Möglichkeit hatte, die Geschehnisse auf der Welt eine derart lange Zeit zu beobachten. Und ich habe nicht viele gekannt, die während dieser Zeit das Hauptaugenmerk auf die Menschen um sich herum gerichtet haben. Der Blick war einfühlsam und nachdenklich und ermöglichte ihr, den Wert der unmittelbaren persönlichen sprachlichen Verständigung zu begreifen.

Elfriede erinnerte sich nicht mehr genau an Datum und Gelegenheit, bei der sie das erste Mal von Esperanto gehört hatte. Es war in den Fünfzigerjahren des vergangenen Jahrhunderts, als ein Eisenbahn-Lehrer ihr ein Buch in die Hand drückte. Sie fing interessiert an zu lernen, musste aber bald wegen eines familiären Ereignisses unterbrechen. Nach dem Umzug nach Frankfurt, fing sie dort in einem Kurs wieder an zu lernen, legte die Kursabschlussprüfung und im selben Jahr die Lehrerprüfung ab. Sie organisierte einen eigenen Kurs, gründete eine Gruppe, lernte Gernot und Elisabeth Ritterspach kennen, schloss sich der Eisenbahner-Bewegung an. Der erste IFEF-Kongress, zu dem sie reiste, fand nach ihrer Erinnerung in Rijeka statt. In diesen Jahren begann sie, ein weltweites Netz von über Jahrzehnte treuen Freunden zu knüpfen.

Die Internationale Sprache war wie für sie geschaffen. Sie lernte sie und wandte sie an aus vollem Herzen, knüpfte und pflegte Freundschaften im Bewusstsein, dass ein Mensch für

La Internacia Lingvo estis kvazaŭ kreita por ŝi. Ŝi lernis kaj aplikis ĝin el plena koro, kroĉis kaj flegis amikecojn konsciante ke unu homo estas respondeca por la alia kaj ke nenio estas memkomprenebla nek persona merito.

Ne nur gravas opinio kaj intenco, sed ankaŭ konkreta faro. Por Elfriede tio signifis investi ĉiujn disponeblajn fortojn kaj kapablojn por subteni edukan projekton en fora Brazilo „por la prospero de Bona Espero" - el la distanco sendante pakaĵojn plenajn da vestaĵoj kaj instrumentoj "utilaj en la savano" kaj el la proksimo kunvivante kaj kunlaborante inter la infanoj kompletigante la familion kiel la zorge aŭskultanta avino el Germanio.

Ŝi havis la imagon kiel homa kunvivado povus funkcii kaj la insistemon ne rezignacii vidante la realecon. Ŝi sciis ke finfine decidas la individuo kaj faris kio estis ebla, mallaŭte sed persiste.

Ŝi lasis al aliaj la brilon kaj ankaŭ glutis la jen pli jen malpli subtilan ĵaluzon de sia ĉirkaŭo. Agnoskon ŝi ĉerpis el okazoj kiel la unua persatelita telefonkontakto inter Japanio kaj Germanio, kiun japana esperantisto estis gajninta kiel premion en konkurso, kaj por kiu li elektis ŝin kiel partnerinon - kaj el la regulaj petoj disponigi ŝiajn talentojn kiel perantino kaj interpretistino. Pri tio ŝi raportis kun evidenta fiero.



La korpaj kapabloj pli kaj pli perdiĝis dum la lastaj jaroj, sed la menso restis klara kaj atenta. Al Siegfried Krüger, kiu antaŭ ŝia 99-a naskiĝtago havis okazon pridemandi ŝin, ŝi rakontis pri la vivo en la maljunulejo, preskaŭ blinda kaj surda. Tiujn limojn ŝi vole-nevole akceptis: "Mi ricevas ankoraŭ multajn leterojn. Sed mi ne povas plu respondi. Kiu tion ne komprenas ... tion mi ne povas ŝanĝi."

den anderen verantwortlich ist, und dass nichts selbstverständlich ist, noch persönlicher Verdienst.

Wichtig sind nicht nur Ansicht und Absicht, sondern auch das konkrete Tun. Für Elfriede hieß das, alle verfügbaren Kräfte und Fähigkeiten aufzuwenden um das Erziehungsprojekt im fernen Brasilien zu unterstützen „für das Gedeihen von Bona Espero" – aus der Entfernung durch den Versand von Paketen voller Kleidungsstücke und Geräte, „die in der Savanne nützlich sein können" und aus der Nähe, wenn sie mit den Kindern zusammenlebte und zusammenarbeitete und die Familie vervollständigte als sorgsam zuhörende Oma aus Deutschland.

Sie hatte eine Vorstellung wie das menschliche Zusammenleben funktionieren könnte und die Beständigkeit angesichts der Wirklichkeit nicht zu resignieren. Sie wusste, das schließlich der Einzelne entscheidet und tat was möglich war, leise aber nachdrücklich.

Sie ließ anderen den Glanz und schluckte auch die mal mehr mal weniger subtile Eifersucht ihrer Umgebung. Anerkennung schöpfte sie aus Gelegenheiten wie dem ersten Satelliten-Telefonkontakt zwischen Japan und Deutschland, den ein japanischer Esperantist in einem Wettbewerb gewonnen und für den er sie als Partnerin gewählt hatte – und aus regelmäßigen Anfragen, ihre Fähigkeiten als Vermittlerin und Übersetzerin zur Verfügung zu stellen. Darüber berichtete sie mit offensichtlichem Stolz.

Die körperlichen Fähigkeiten gingen in den letzten Jahren mehr und mehr verloren, der Geist blieb aber klar und aufmerksam. Siegfried Krüger, der vor ihrem 99. Geburtstag Gelegenheit hatte sie zu befragen, erzählte sie über das Leben im Altersheim, fast blind und taub. Diese Grenzen akzeptierte sie widerwillig: „Ich bekomme noch viele Briefe. Aber ich kann nicht mehr antworten. Wer das nicht versteht ... das kann ich nicht ändern." Bitter war aber das Bewusstsein der verlorenen und abgenommenen Selbständigkeit, über die Lage, in jeder Hinsicht abhängig und

Amara tamen estis la konscio pri la perdita kaj forprenita memstareco, pri la situacio esti ĉiurilate dependa kaj devigata obstine defendi „senutilajn“ membrecojn kaj abonojn. Pri Esperanto ŝi rifuzis rezigni.
Ŝi ne estus vojaĝinta, ŝi ne estus korespondinta, ŝi ne estus havinta verajn geamikojn en almenaŭ tridek landoj. Esperanto valorigis ŝian vivon, Elfriede diris en retrospektivo.
Elfriede Kruse mortis amata kaj respektata post longa vivo dum nokta dormo.

Guido Brandenburg

gezwungen zu sein, alle „unnützen“ Mitgliedschaften und Abonnements eigensinnig zu verteidigen. Auf Esperanto zu verzichten hat sie sich geweigert.
Sie wäre nicht gereist, sie hätte nicht korrespondiert, sie hätte keine wirklichen Freunde gehabt in wenigstens dreißig Ländern. Esperanto hat ihrem Leben einen Wert gegeben, sagte Elfriede im Rückblick.
Elfriede Kruse starb geliebt und respektiert nach einem langen Leben im nächtlichen Schlaf.

(trad. Brandenburg)

Korekto en terminologia laboro: Trakcio lokomotiva-kondukvagona

En la eldono 01/2016 de la Fervoja Esperantisto ni asertis, ke la duetaĝa IC2 konsistas artike kombinitaj vagonoj kaj estas produktita kiel tutaĵo. Tio estis evidenta eraro.
La vagonoj havas ordinarajn duaksajn boĝiojn ambaŭflanke kaj estas trakteblaj same kiel la unuetaĝaj IC-vagonoj.



Vagonofino kun duaksa boĝio kaj konektaj tuboj
Wagenende mit zweiachsigem Drehgestell und Verbindungsschläuchen

La ceteraj informoj rilate la trakcion lokomotivan-kondukvagonan tamen estas tute en ordo.

Guido Brandenburg

Korrektur in der Terminologiearbeit: Wendezugbetrieb



In der Ausgabe 01/2016 des Fervoja Esperantisto hatten wir behauptet, dass der Doppelstock-IC2 aus gelenkig kombinierten Wagen besteht und als Ganzes produziert wurde. Das war ein offensichtlicher Fehler.
Die Wagen haben beidendig gewöhnliche zweiachsige Drehgestelle und sind zu behandeln wie die normale eingeschossige IC-Wagen.
Die übrigen Informationen zum Wendezugbetrieb sind aber ganz in Ordnung.

(trad. Brandenburg)

Pensiulaj revoj

Revis en maturaj jaroj
ni pri la farotaj faroj:
Pensiuliĝinte ni
faros fine tion ĉi.

Legos ni la poezion,
studos la filozofion,
lernos plurajn lingvon krome,
kiam restos ni endome.

Fariĝinte pensiuloj
iĝas ni malagemuloj.
Bedaŭrinde malfortiĝas
ni, la cerbo kadukiĝas.

Iĝas ni nun maljunuloj,
eble ankaŭ plisaĝuloj.
Vanis ja revado nia.
Pensiuliĝo estas tia.

(trad. Retzlaff)

Rentnerträume

Als reifer Mensch man davon träumte,
daß man das, was man noch versäumte,
als Rentner doch nachholen kann
und endlich sein ein Bildungsmann.

Man möchte machen eine Kur
in hochgeistiger Literatur -
eindringen in die Philosophie,
die man bisher kapiert noch nie -

Dabei noch lernen fremde Sprachen.-
Es nicht zu schaffen wär´zum Lachen!
Doch leider werden wir gemächlich,
nebst Glieder auch das Hirn gebrechlich:

Ins Alter schlurfen wir hinein
und lassen Krummes gerade sein.
Das früh´re Träumen war vergebens...
So ist der Lauf des Rentnerlebens.

Alfred Knapp



foto:
Deutsche Fotothek
Wikimedia_Commons

Redaktofino por FE 03/2016 estos la 15.08.2016		Redaktionschluss für FE 03/2016 ist 15.08.2016	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Karl Bernhard GEFA	Name	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16500905000000953729	IBAN:	DE16500905000000953729
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12